APRILO

# 2018

# La Cirkulero

101 NovaSerio

CENTRE CULTUREL ESPERANTO-TOURAINE
Maison des Associations, Halles de Tours
Place Gaston Pailhou
37000TOURS

## Kio okazis ĵuse ?

**Dimanĉon, la 8an de Aprilo :** Dominique Baron organizis viziton, kiel ĉiu jaro, okaze de la datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof.

Ni rendevuis antaŭ la pordo de la kastelo de Fontenay, proksime al Lignières de Touraine. Sinjoro Marko afable akceptis nin por la vizito de sia bieno.

Kelkaj membroj de la grupoj de Ingrandes kaj de Le Mans aldoniĝis al nia grupo.

Vi ne vidos fotojn de la kastelaj salonoj. La posedanto permesis nur eksterajn fotojn.




## Que s'est-il passé récemment ?

**Dimanche 8 avril :** Dominique Baron avait organisé une visite, comme chaque année, à l'occasion de l'anniversaire de la mort de Louis Zamenhof.(14/04/1917)

Nous avions rendez-vous devant la porte du château de Fontenay, près de Lignières de Touraine. Monsieur Marko nous a gentiment accueillis pour la visite de sa propriété.

Quelques membres des groupes d'Ingrandes et du Mans s'étaient joints à nous.



Vous ne verrez pas de photos des pièces du château, le propriétaire n'ayant permis que des photos de l'extérieur.

x







Post tiu interesa vizito, ni tre bone tagmanĝis en la restoracio « Les Trois Lys » en Azay-le-Rideau.

Après cette visite intéressante, nous avons très bien déjeuné au restaurant « Les Trois Lys » à Azay-le-Rideau.

## Restadaj tarifoj (€)

**Programo tutsemajna**

| | |
|---|---|
| Kurso kaj aktivaĵoj | 70 |
| Kurso – duon-tarifo ĝis 16-jaroj | 35 |
| Nur kulturaj aktivaĵoj | 35 |

**Loĝado (por unu nokto k unu persono)**

| | |
|---|---|
| Individua granda ĉambro | 38 |
| Individua ĉambro | 27 |
| Par-ĉambro (2 p.) | 19 |
| Familia ĉambro (3-4 p.) | 14 |
| Tarifo flekseblеco (dormejo) | 9 |
| Tendumado | 3 |

**Manĝoj (duon-tarifo ĝis 16 jaroj)**

| | |
|---|---|
| Matenmanĝo | 4 |
| Tagmanĝo kun kafo | 10 |
| Vespermanĝo | 9 |

Rabatoj: pli ol 6 noktoj: 5%,
antaŭpago 2 monatojn antaŭe: 10%.

## Situo

Kastelo Greziljono situas apud Baugé, urbeto en okcidenta Francujo, 250 km sudokcidente de Parizo inter Angers, Le Mans kaj Tours, en la Luar-regiono.




## La Bieno

La bieno ebligas la okazigon de la Esperanto-programo de la Kulturdomo mem, kaj ankaŭ de aliaj Esperantaj grupoj.

Ekster la Esperanto-programoj, ne-esperantistaj grupoj povas lupreni la kastelon kaj bienon por familiaj festoj, profesiaj seminarioj aŭ por turismadi.



En la Esperanto-programo, oni povas elekti la daŭron de sia restado laŭ taga tarifo aŭ resti tutan semajnon. Ekzistas tutsemajnaj kursoj por plulerni Esperanton, sed oni povas partopreni nur kulturajn aktivaĵon aŭ profiti liberan restadon.

Pri ĉiu semajno, vidu la programon en la retejo kiu afiŝas unue la Esperanto-kursojn kaj poste la aliajn aktivaĵojn.

## Programo regula

***PRINTEMPaS**, KER-ekzameno* en aprilo
***koruso** Interkant'* en aprilo kaj oktobro
***Someraj semajnoj*** en julio kaj aŭgusto
***AŬTUNE*** fine de oktobro

Detaloj en gresillon.org/agendo

# Kastelo Greziljono

Esperanto-kursoj
Esperanto-aktivaĵoj
Ludono al grupoj
Popola edukado
Seminarioj
Eventoj

*En la centro de Anĵuo troviĝas plej bona loko por malstreĉiĝi, lerni kaj amuziĝi*

**Kulturdomo de Esperanto**
**Kastelo Gresillon**

St-Martin d'Arcé, F-49150 Baugé en Anjou
Tel. +33 (0)2 41 89 10 34
kastelo@gresillon.org
**www.gresillon.org**

## Aktivado

La Kastelo disponas salonon kaj bibliotekon kun interreta konekto per vifio.
Plie en la kromdomoj estas:
- festa kaj prelega salono (80 sidlokoj)
- 3 ĉambroj por agadoj (entute 40 sidlokoj)
- libro-binda ateliero







## La Parko

- tabloteniso sub tegmento
- retpilkejo
- lernpado pri bestoj kaj plantoj









## Loĝado

La kastelo kaj ĝiaj kromdomoj disponas 24 ĉambrojn kun 60 litoj.

La litĉambroj estas ekipitaj per lavkuvoj. Necesejoj kaj duŝoj troviĝas en la koridoroj.

Granda herbejo kun multaj tendlokoj disponas pri apartaj necesejoj kaj duŝoj.

## Manĝado

Du manĝoĉambroj ebligas servi al ĝis 80 homoj tri manĝojn tage, vegetare kaj ne.
Memzorgantaj gastoj povas manĝi en kromdomo aŭ en la tendumejo.



## Lupreni la bienon

La Kastelo facile gastigas grupajn eventojn por ĝis 60 homoj, kontraŭ ne tro alta kosto.
La ĉi-subaj tarifoj en eŭroj inkluzivas krompagon por elektro, akvo kaj hejto, sen la kosto de manĝoj kaj purigado.
La Kastelo konsilas siajn kutimajn restoraciajn servojn por bonkvalitaj manĝoj.

| | |
|---|---|
| Unu-nokta semajnfino | 880€ |
| Du-nokta semajnfino | 1 150€ |
| Tri-nokta semajnfino | 1 420€ |
| Tuta semajno – ekster ferioj | 2 505€ |
| Tuta semajno – dum ferioj | 4 410€ |
| Salono Zamenhof kaj parko | 210€ |
| Kastelo sen kromdomoj (sen loĝado) | 345€ |
| Kastelo kun kromdomoj (sen loĝado) | 375€ |
| Lit-tukaro por 1 persono | 7€ |

**Kiel ricevi pliajn informojn?**
**Kiel informiĝi pri dispono?**
**Kiel viziti la Kastelon?**

Kontaktu nin, kaj ni plezure respondos viajn demandojn.
La retejo pri la Kastelo prezentas ĝisdatajn informojn pri dispono kaj lupreno:
- www.gresillon.org/luo
- www.gresillon.org/dispono

# Kastelo Greziljono

**www.gresillon.org**





## Venontaj gravaj datoj

**Dimanĉon, la 13an de Majo, de la 14a ĝis la 18a :** Eŭropa Tago en ĝardeno « Les Prébendes » en Tours (Budo Esperanto).

**Vendredon, la 25an de Majo En Universitato de Tours, salono Thélème :** spektado de la filmo farita la 28an de Marto. (horo anoncota)

**Inter la 1a kaj la 3a de Junio :**Turneo de Normand Fleury kaj de sia edzino Zdravka.

Jeannine kaj Gérard Layseman rezervis la salonon de la kvartalo « Les Fontaines »

**Prelegoj, je la 17a, sabaton la 2an de Junio.** Zdravka prelegos pri « kiel volontuloj helpas integriĝon en nova lando ?» kaj Normand « Kiel arbaroj povus savi homaron ? » Post tiuj prelegoj, vespermanĝo surloke (Ĉiu kunportos manĝaĵon, trinkaĵon kaj ilarojn).

**Sabaton, la 16an de Junio** : Tradicia pikniko (loko kaj horo anoncotaj)

## Prochaines dates importantes

**Dimanche 13 mai, de 14 h à 18 h :** Journée de l'Europe au jardin des Prébendes à Tours. (stand Espéranto).

**Vendredi 25 mai : à l'université de Tours, salle Thélème :** projection du film tourné le 28 mars (l'heure sera annoncée).

**Entre le 1er et le 3 juin** : tournée de Normand Fleury et de son épouse Zdravka.

Jeannine kaj Gérard Layseman ont réservé la salle du quartier « Les Fontaines »

**Conférences, à 17 heures, samedi 2 juin.** Zdravka expliquera comment des volontaires aident à l'intégration (des immigrants dans le pays qui les accueille) ? » et Normand dira « Comment les forêts pourraient sauver l'humanité ?»Après ces conférences, dîner sur place. (Chacun apportera nourriture, boisson et couverts).

**Samedi 16 juin** : Pique-nique traditionnel (on annoncera le lieu et l'heure)